

**Julio/Aŭgusto 2026**

Esperanto Societo Frankfurto

# Esperanto-Informilo



Foto: U. Fellmann, la 1-an de julio en Frankfurto: "Vera nubskrapulo, ĵus fotita dum kafumado en la Nubkafejo."

---

Mesaĝo de la prezidanto: La longdaŭra varmo fine de junio en mezeŭropo estis nekutima, des pli ke aliloke kaj samtempe, kiel ekzemple en Grekio la temperaturo estis tute agrabla. Oni povas kompari temperaturojn de la plej gravaj urboj je retpaĝo https://www.timeanddate.de/wetter/?sort=6. Tiu norvega firmao i.a. ofertas tempajn kaj veterajn datumojn je sia retpaĝo *timeanddate.com*, kie eblas kompari ankaŭ pasintajn datumojn. Alia menciinda retpaĝo estas *weatherspark.com*, kie oni povas kompari veterdatumojn inter ajnaj urboj, ekzemple la diferencoj inter Frankfurt je Majno kaj Frankfurt je Odra: https://weatherspark.com/compare/y/61302~78096/Comparison-of-the-Average-Weather-in-Frankfurt-am-Main-and-Frankfurt-(Oder)

Mi deziras al ĉiuj legantoj belegaj someraj tagoj,
G. Hennemann

---

Rubrikoj ĉi-numere:


- Programo
- El la klubo
- Eseo
- Diversaĵoj
- Esperantaĵo
- Lasta paĝo



Kolofono:
Redaktoro teamo:
Georg Hennemann
Ulrich Fellmann
Korektanto: F.U.



c/o Georg Hennemann
Rehgartenstrasse 16
35683 Dillenburg
Tel.: 02771 8196614


**Bankverbindung / bankkonto:**
Esperanto-Gesellschaft F.a.M
IBAN: BE92 9051 1007 7223
BIC: TRWIBEB1XXX
bei: Wise, Belgien

**Jahresbeitrag / jarkotizo:**
ESF+DEB-Beitrag: 96 €
Familienmitglied: 48 €
Nur ESF: 24 €
Familienmitglied: 12 €

# Programo

**Unua mardo**
La 7-an de julio 2026

"Elsendo de E-Informilo"

———

**Dua mardo**
La 14-an de julio 2026
ekde la 19-a horo: Interna babilado per Jitsi

Ligilo: https://meet.jit.si/EsperantoFrankfurtamMain

———

**Tria mardo**
Somera paŭzo

**Ne forgesu:** Sabaton, la 18-an de julio: Somerfesto en frankfurta Palma Ĝardeno (Palmengarten)
Ni renkontiĝos en Kafejo Siesmayer apude.
https://www.cafe-siesmayer.de/

———

**Kvara Mardo**
la 28-an de julio
ekde la 19-a horo: „Senprograma samideana babila renkontiĝo"
Stattcafé, Grempstraße 21, 60487 Frankfurt am Mai

---

Bildfonto kappaĝo: Panorama vido el la 2021 rekonstruita Goetheturm en Frankfurto je Majno

By Tobias.Nicol – Own work, CC BY-SA 4.0, https://commons.wikimedia.org/w/index.php?curid=103455745,

https://commons.wikimedia.org/wiki/Henninger-Turm#/media/File:Cityscape_Frankfurt_2021_Panorama.jpg

# El la klubo

**Anoncoj:**
**Nun komenciĝas somerpaŭzo, sed rememoru tiujn renkontiĝojn:**

- 18.07.2026 14:00 Uhr Somerfesto en frankfurta Palma Ĝardeno (Palmengarten), Ni renkontiĝos en Kafejo Siesmayer apude. https://www.cafe-siesmayer.de/
- 11.08.2026 18:00 Uhr Ni renkontiĝos sur Rossmarkt kaj ĝuas la etoson de la „Pomvinfesto".
- 18.08.2026 18:30 Uhr Klubvespero kun lingva rondo kaj prelego kun fotoj de la UK en Graco.



**elstara foto:** sendita de A. Stecaj, 6-an de junio. Mia foto de la tago: „Somera herbejo/ĝardeno"

# Fotonoj: Portantoj de informo kaj realigantoj de ĉiuj konataj materioj, kemiaj kaj biologiaj strukturoj kaj procezoj kaj laste ankaŭ de la vivo

Eseo de Georg Hennemann

Fotonoj estas senmasaj elementaj kvantumoj kiuj en vakuo “flugas” per lumrapideco kaj povas havi tre grandan gamon de diversaj frekvencoj aŭ ondlongoj. La plej konataj fotonoj estas tiuj de ni videbla lumo, do tiuj inter 400 ĝis 800 nanometroj de ondlongo. Sed tiuj estas nur plej eta parto el ĉiuj ekzistantaj fotonoj kiuj ebligas kaj estiĝas nian konatan mondon. Ĉiuj ekzistantaj atomoj kaj kemiaj ligoj inter atomoj kaj molekuloj estas realigita per interŝanĝo de virtualaj kajaŭ realaj fotonoj. La t.n. elektrostata forto kiel ekzemple la Coulomb-forto inter nukeaj protonoj kaj elektronoj estas kaŭzata per interŝanĝo de virtualaj fotonoj. El la libro *„De la kvantumfiziko al la konscio, Kosmo, Menso kaj Materio“* de B. kaj T. Görnitz mi citas*:*

“Ĉiu procezo, kiu povas okazi en vivanta estaĵo, konstante elsendas sennombrajn fotonojn, kiuj servas kiel portantoj por la prilaborata senchava informo. Tamen, fotonoj kun la frekvenco de videbla lumo malofte troviĝas inter ĉi tiuj. Lampiroj (germane: Glühwürmchen) kaj kelkaj profundmaraj fiŝoj estas konataj esceptoj. La kontinua emisio de fotonoj certigas konstantan transiron de kvantumaj al faktaj statoj. Ĉiu elsendita fotono povas esti komprenata kiel indiko de parta procezo. El la rezultantaj partaj faktoj ene de la vivanta organismo, novaj kvantumaj statoj estas preparitaj. La interagaj procezoj ene de ĉelo kondukas al konstanta kreado kaj malkreado de interplektiĝo, dum informoj eskapas el la sistemo. Kvantumteorio diras al ni, ke ĉiu interago rezultigas interplektiĝon de la partoprenantaj sistemoj, tiel kreante unuecan tutaĵon. Ĉi tiu interplektiĝo povas esti pludisvastigita per postaj interagoj. Tial, ni povas supozi, ke vivanta ĉelo posedas ampleksan, "tutecan" informan strukturon kapablan kunordigi kemiajn reakciojn. Tial, biologiaj procezoj povas esti vere komprenitaj nur per la tavola strukturo de kvantaj kaj klasikaj priskriboj. Se tamen oni koncentriĝas nur sur unu el ĉi tiuj du aspektoj — ofte nur sur la klasikan — la priskribo de biologiaj procezoj restas nekomprenebla, ekzemple la fakto kiel eksterordinara nombro da ŝajne izolitaj reakcioj povas formi tian fajne agorditan tutaĵon. Malgraŭ la konstanta interŝanĝo de informportantoj, tuteca informstrukturo jam ekzistas ene de la individua ĉelo. Ĉi tiu strukturo formas la bazon por reguligi ĉelajn procezojn. El nia perspektivo, tamen, oni tute ne devus ankoraŭ paroli pri "konscio" en ĉi tiu ĉela kunteksto.”





Fig. 1.1 La baza priskriba sistemo de naturo estas la dinamika tavolstrukturo de kvantuma fiziko kaj klasika fiziko. Kvantuma teorio estas la ĝenerala universala strukturo. La matematikaj limtransiroj inter tiuj du malsamaj teorioj estas referitaj kiel "kvantigo" kaj kiel "transiro al la klasika limvaloro". La historia vojo kondukis de klasika teorio al kvantuma teorio. Por la klasika limvaloro de kvantuma teorio, oni konsideras multegajn kvantojn:

Ĉi tio ebligas statistikan traktadon, per kiu la averaĝaj valoroj tiam en la plej multaj kazoj montros faktan aŭ realan konduton kaj do povas esti priskribitaj klasike. Kiam oni traktas tian limon matematike por la klasika limvaloro, almenaŭ unu el la fizikaj grandoj rajtas iĝi senfina. Por la scienca priskribo de la vivo, ambaŭ manieroj de priskribo - la kvantuma kaj la klasika - estas postulataj. Kaj pro tio la longe atendita unuigo de kvantuma fiziko kaj la relativeca teorio de Einstein per kvantigo de gravito neniam sukcesos. El la perspektivo de kvantumo fiziko la relativecteorio de Einstein estas nur transiro al la klasika limkazo.

Ligilo: https://www.academia.edu/117208926/Von_der_Quantenphysik_zum_Bewusstsein
https://www.derstandard.at/story/3000000329359/wie-passen-gravitation-und-quantenphysik-zusammen

# Mondo en Transiro

de Felmano Ulriko

Multe ŝanĝiĝis ekde la jaro 2000. Ĉu la homoj iĝis pli saĝaj? Nu, almenaŭ la saĝtelefono konkeris la mondon, elektraj aŭtoj aperis, aŭtonoma veturado estis elprovata kaj testata, kaj artefarita intelekto kaŭzis sensacion, poste iĝis ĉiutagaĵo. Nenio el ĉi tio venis el Eŭropo aŭ Azio; ĉio venis el Usono. Rilate komputiloj oni tion jam konis, sed la antaŭe mondgvidaj aŭtoproduktantoj, el Japanujo kaj Germanujo, VW kaj Toyota, alterne la numero unu en tutmondaj vendoj, ne prenis la temon de elektraj aŭtoj kaj aŭtonoma veturado serioze.

Tio eĉ pli surprizu, ĉar dum la lasta jarmilo, VW plurfoje prezentis elektrajn aŭtomodelojn je la tutmonde plej granda aŭtomobila foiro, la IAA en Frankfurto ĉe Majno, por demonstri siajn kapablojn. Tamen, oni neniam efektive surmerkatigis ilin. Firmao Audi iam faris duonkoran provon, lanĉante la Audi-modelon Duo en la 1990-aj jaroj, samtempe kun la Toyota Prius. Audi ĉesigis sian aŭton post tri monatoj "ĉar la vendoj estis tro malaltaj" - post nur tri monatoj! Toyota pluproduktis la Prius, 15 jarojn poste fariĝinte profita, kaj gajninte sperton pri elektraj veturiloj.

Kiam Elon Musk kaj lia kompanio Tesla poste ekigis la elektroaŭtan aferon kaj celis igi elektrajn aŭtojn granda sukceso, ĉefoj de germanujaj aŭtoproduktantoj mokis Teslan ĉar ĝiaj veturiloj ne estis teĥnike pioniraj: la baterioj estis "nur" ordinaraj, kaj Tesla ne sciis kiel efike fabriki aŭtojn. Do kial VW, Mercedes kaj BMW ne aliĝis al la evoluo, superis Teslan, kaj konstruis la plej bonajn elektrajn aŭtojn?

La kulpo kuŝas ĉe arogaj maljunaj viroj, mense ankoraŭ vivantaj en la lasta jarcento, sed estantaj la ĉefoficistoj de la nuntempaj germanujaj firmaoj. Ili respondecas pri la fakto, ke la delonge ŝlosila kaj profitega industrio de Germanujo, la aŭtomobila sektoro, ne nur maltrafis la ŝancon transiri al elektraj veturiloj, sed eĉ aktive sabotis tion. Germanujo facile povintus esti pioniro en ĉi tiu areo; la scio kaj la emo jam ekzistis inter inĝenieroj dum la 1980-aj jaroj. Ili eĉ estis pioniroj en esplorado pri hidrogenpelataj aŭtoj (Mercedes) kaj pri aŭtonoma veturado (VW/Audi kaj la Bundeswehr-universitato Munkeno en la 1990-aj jaroj). Sed la ĉefoficistoj de ĉi tiuj kompanioj tute klare montris, ke ili kredas, ke elektraj aŭtoj neniam povos anstataŭigi brulmotorojn, kaj neniu volos aŭtonomajn aŭtojn, nek ili iam estos aprobitaj en Germanujo.

Simple esprimite, por germanaj aŭto-estroj, aŭtomobilo devas sonigi "vrum-vrum" kaj esti stirata permane; aliokaze, ĝi ne estas vera aŭtomobilo.

Tio memorigis min pri nia iama imperiestro Vilhelmo la dua, kiu antaŭ la unua mondmilito diris: "mi konfidas je la ĉevalo! La aŭtomobilo estas nur moda kuriozaĵo, kiu baldaŭ denove malaperos."

Kaj rilate la klimatoŝanĝiĝo Eŭropo same fiaskis, sed ne sole. La temperaturoj mondvaste kreskas, sed nia nova germanuja kanceliero volas plilongigi la vivon de la brulmotoraŭtoj super la ĝisnune oficiala limdato, kaj anstataŭ investi en ventturbinojn kaj sunĉelojn li volas subteni la evoluigon de fuzienergiaj elektrejoj, kiuj eble nur ekzistos post 40 jaroj, kio estas tro malfrue, eble ekzistos neniam, tamen kostos multajn miliardojn. Dume, Ĉinujo ekhavis al si nun pli da elektroaŭtaj firmaoj ol la cetero de la mondo kombinite, kaj nun ankaŭ produktas, vendas, kaj instalas pli da sunenergie kajaŭ ventturbine pelataj elektrejoj ol la monda cetero.

Tamen, Usono volas reiri al "malmultekosta" petrolo, anoncis aneksi Kanadon, Grenlandon, kaj Panamon, kaj konfiski la petrolon de Venezuelo kaj Irano. Kaj Rusujo volas bombigi Ukrainion en la ŝtonepokon, foje jam minacis ties subtenantojn per uzo de nukleaj armiloj, plurfoje jam tratranĉis marajn interretkablojn, kaj sendas dronojn en Baltikon kaj Polujon. Paralele okazadas terura amasmurdado de civiluloj en Gazao kaj diversaj Afrikaj kaj Aziaj landoj.

La demando ŝajnas ne esti, kiel ni solvos niajn problemojn, sed kiel la homaro ekstermiĝos: ĉu per la klimatoŝanĝiĝo, per artefarita intelekto, aŭ per nuklea milito.

# Diversaĵoj

## Ŝerco

Virino eniris bestvendejon por aĉeti akvujon por sia hundo.
La vendistino montris al ŝi plurajn modelojn.
- "Ĉu vi volas havi iun, sur kiu estas skribite "Hundo"?
- "Tio ne gravas. Mia edzo ne trinkas akvon, kaj la hundo ne povas legi!"

**Proverbo de la monato** (elektita de Georg)

Hodiaŭ mi prezentas proverbon, kiu temas pri somera varmeco kaj la longe atendita malvarmiĝo


„Pli bone estas ŝviti, ol tremi"

https://www.robkeetlaer.nl/esperanto/proverbaro/proverbo_001969.htm

**<u>Kvizo</u>**
De Felmano Ulriko

Hodiaŭ anstataŭ unun enigmon mi starigos plurajn, inter si iel ligitajn demandojn. Jen la kvizdemandoj:
1 En kiu jaro kaj kie okazis la unua, ankoraŭ ne oficiala, internacia Esperantokongreso?
2 En kiu jaro fondiĝis la Esperanto-Societo Frankfurto?
3 En kiu jaro estis la Fundamento de Esperanto dum UK aprobita?
4 Zamenhof dufoje vizitis Frankfurton kaj poe faris oficialan prelegon. En kiuj du lokoj li faris tion?
5 Kiel nomiĝas la iama prezidanto de nia ESF kiu savis dum la Nazia tempo, kiam Esperanto estis malpermesata, la bibliotekon de la klubo en sia hejmo?

Bonŝancon!



*D.ro Zamenhof kaj Klara en Frankfurt.*

# Esperantaĵo

Novaĵo:
La 1-an de junio forpasis Probal Dasgupta 🖤
(Vikipedioartikolo pri li:
[https://eo.wikipedia.org/wiki/Probal_Dasgupta?wprov=sfla1](https://eo.wikipedia.org/wiki/Probal_Dasgupta?wprov=sfla1)).



Wikipedia
Probal Dasgupta
Probal DASGUPTA (bengale প্রবাল দাশগুপ্ত), foje esperantigita kiel Daŝgupto (naskiĝis la 19-an de septembro 1953 en Kalkato — forpasis la 1-an de junio 2026) estis barata esperantisto kaj leksika esploristo, en la jaroj 2007–2013 prezidanto de Universala Esperanto-Asocio. Li estis elektita por trijara periodo en la jokohama Universala Kongreso en aŭgusto 2007 kaj reelektita en la 95-a UK en Havano en 2010.

Nekrologo de de Humphrey Tonkin pri la ĵus pasintaj
Ili ĉiuj iris en la regnon de la lumo… - La Ondo de EsperantoLa Ondo de Esperanto

Rilate al la **monda piedpilka konkurso** oni verkis tiun amuzegan kanton:
Ni iru!! Sporta himno en esperanto! – Tubaro
https://tubaro.aperu.net/v/ytb_hL7znakmdc4/
#esperanto #football #worldcup2026
#esperantomusic




**ZEO-fotokonkurso**
"Vikio Amas ZEOjn" estas internacia fotokonkurso por promocii la Esperanto-heredaĵon ĉirkaŭ la mondo pere de Vikimediaj projektoj. Legu la kondiĉojn de la konkurso ĉe https://sezonoj.ru/2026/07/konkurso-62/ kaj partoprenu.

Vikio amas ZEOjn

# Dulanda kongreso en Olomouc

En la novaĵretejo "La Ondo de Esperanto" aperis artikolo pri la Ĉeĥa-Germana Esperanta Kongreso, kiu okazis de la 22a ĝis la 25a de majo 2026 en Olomouc (Ĉeĥio). Legu ĝin ĉe https://sezonoj.ru/2026/06/chehio/



La supra foto: Granita, pli ol dumetra memorŝtono pri la apuda Esperanto-arbo (Liriodendron), plantita okaze de la Ĉeĥoslovaka Esperanto-kongreso en Olomouc en 1932, en la parko Smetanovy sady en Olomouc. (Dirk Huthmann)

La Ĉeĥa-Germana Esperanta Kongreso okazis de la 22a ĝis la 25a de majo 2026 en Olomouc (germane Olmütz), Ĉeĥio. La ĉeforganizantoj estis Jirka Tomeček kaj Mirka Tomečková, jam konata kiel organizantoj de la pasintjara UK en Brno.
La kongreso okazis en la restoracio "Fontana", nomita laŭ la granda fonto antaŭ la pordo de la kongresejo, situanta en granda parko. La varma vetero estis granda avantaĝo de la kongreso. Dum unu nokto la kongresanoj sidis en la parko kaj trinkis la restaĵojn de la ĵus okazinta vingustumado.

Vendredvespere prelegis Ewald Schick pri la 111a Universala Kongreso en Graz. Sabate antaŭtagmeze okazis la asembleo de GEA kaj de AGEI. Krome en sabato Lu Wunsch-Rolshoven demandis "Kion scias lingvistoj kaj ŝtatoficistoj?" koncerne al misinformado de Esperanto. Poste okazis gustumado de ĉeĥaj vinoj. Dimanĉe Petr Chrdle montris al ni la mondajn heredaĵojn en la teritorio de Ĉeĥio. Poste Vladimir Türk prelegis pri la historio de la trampa movado en Ĉeĥio. La adiaŭaj prelegoj estis de Mirka Tomečková "Dezerto en ni" kaj Jirka Tomeček "Historio de la regiono".

Dimanĉe okazis tuttaga ekskurso al Svitavy kaj Česká Třebová. En Svitavy Libuše Dvořáková gvidis nin tra la Esperanto-Muzeo. Posttagmeze ni konatiĝis kun la apuda urbo Česká Třebová. Nin bonvenigis Jitka Peková, vicdirektorino de la urba muzeo de Česká Třebová.

# Graco: Pli ol mil kongresanoj



Je la 1a de julio 2026 al la 111a Universala Kongreso de Esperanto, kiu komenciĝos post unu monato, la 1an de aŭgusto 2026 en la urbo Graco (Graz, Aŭstrio), aliĝis 1069 personoj el 62 landoj, plej multe el Germanio (143), Francio (97) kaj Pollando (92). Legu pli en la novaĵretejo "La Ondo de Esperanto" https://sezonoj.ru/2026/07/graco-28/

https://www.esperanto-muenchen.de/esperanto-weltkongress-2026-graz-anfaenger/



https://www.graztourismus.at/kongress/en/congress-calendar/111-a-universala-kongreso-de-esperanto-2026_ccd_10235

# Lasta Paĝo

Satiro el interreta telegrama babilado:







